

# ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Dritter Jahrgang



Nr. 11, November 1950

## Friede UND ESPERANTO

Wenn ich einen Menschen nach seinem Willen frage, so wird er ganz gewiß sagen: „Ich möchte gern arbeiten, meinen vollen und gerechten Lohn dafür bekommen und im übrigen mein Leben frei nach meinen Bedürfnissen und Neigungen gestalten.“

So oder doch ähnlich wird mir jeder auf meine Frage antworten, mag er nun Engländer, Franzose, Russe oder Deutscher sein. Die Menschen sind allgemein arbeitswillig und friedsam, nicht weil es ihnen etwa angeboren ist, nein, allein schon zu ihrem eigenen Nutzen. Der Krieg beraubt sie ihrer Ruhe und Sicherheit und stört sie in ihrem Lebensgenuß. Nur wenn man

die Dinge des täglichen Bedarfs auf dem Wege des Raubes und des Krieges besser und bequemer erlangen könnte als auf dem Wege des friedlichen Güteraustausches, wäre es verständlich, wenn die Menschen zum Kriege ja sagten. Wenn heute wieder das drohende Gespenst eines dritten Weltbrandes schicksalsschwer vor unserer Zukunft steht, so aus Ursachen, die in den sozialen Mißverhältnissen unserer Wirtschaft zu suchen sind, aus Ursachen, die eben jenen freien Austausch der Güter behindern und somit Not und Elend hervorrufen. Heute genau wie in vergangenen Zeiten herrscht allgemein die Ansicht vor: „Das scharfgeschliffene

Schwert ist die beste Garantie des Friedens.“ Aber zwei Weltkriege mit ihren schweren Folgen haben uns klar gezeigt, daß die einseitig militärische Auffassung mit psychologischer Notwendigkeit den Krieg herbeiführt. Deshalb muß heute gelten: „Si vis pacem, para pacem — wenn du den Frieden willst, bereite den Frieden!“ Wenn wir den Frieden wollen, müssen wir die soziale Gerechtigkeit aufrichten, die jedem das Seine gibt nach seinen Leistungen, die aber die wirtschaftliche Ausbeutung von Menschen durch Menschen unmöglich macht. Bei Thomas a Kempis heißt es: „Tene te primo in pace, et tunc poteris alios pacificare — Halte dich zuerst selbst in Frieden, und dann kannst du andere befrieden.“ Diese Erkenntnis gilt sowohl für menschliche als auch staatliche Beziehungen. Denn nur die Völker werden miteinander in Frieden leben können, welche die soziale Frage gelöst haben.

Immer ahnungsvoller rötet sich fern am Horizont der Morgen einer neuen Kultur, einer neuen Gesellschaftsordnung, in der die Staatsgrenzen nur noch Verwaltungscharakter besitzen. Selbst Atom- und H-Bomben können diese Entwicklung zwar hemmen aber nicht abwenden. Wie die Nationalsprache in jeder völkischen, so erfüllt Esperanto in jener neuen weltweiten Kulturgemeinschaft eine der wichtigsten Funktionen als Mittlerin von Volk zu Volk. Der französische Gouverneur M. Chauchy sagte auf dem diesjährigen Deutschen Esperanto-Kongreß in Mainz: „Wenn alle Männer Esperanto sprächen, gäbe es keine Besatzung, weil es dann keinen Krieg mehr gäbe.“ Diese Worte können wir voll und ganz anerkennen, nur einer Tatsache müssen wir uns dabei bewußt sein: Wie die Gleichheit der Sprache in unserem eigenen Lande keine Gewähr für Gerechtigkeit bietet, so kann auch eine für alle Menschen gemeinsame Weltsprache ursächlich noch keinen Frieden herbeiführen. Die Einführung des Esperanto als allgemein gültige Welthilfssprache kann nur eine Sache des Friedens sein.

Wenn wir den Frieden gewinnen wollen, so nur auf der Grundlage der Gerechtigkeit. Grundpfeiler des Bürger- und Völkerfriedens ist die soziale Freiheitsordnung unseres gesellschaftlichen Zusammenlebens. Die Krönung des Friedens ist die Brudersprache Esperanto. BeHa.

## Bad Nauheim ehrt Dr. Zamenhof

Am 17. Sept. 1950 veranstaltete die Stadt- und Kurverwaltung von Bad Nauheim eine Feier zur Enthüllung einer Gedenktafel für Dr. Zamenhof, dem Erfinder der Weltsprache Esperanto.

Nach Begrüßungsworten durch

Herrn Denker von der Kurverwaltung knüpfte Oberstudiendirektor Dr. Kreutzer in seiner Festrede an den Kuraufenthalt Zamenhofs in Nauheim 1907 an und kennzeichnete das Lebenswerk Zamenhofs in seiner

(Fortsetzung Seite 2)



Die Zuhörerschaft bei der Enthüllungsfeier. In der ersten Reihe (4. von links) S-ano C. Barthel, persönlicher Freund Dr. Zamenhofs. Neben ihm Frau Lahner und Herr Zimmermann, die mit ihm 1907 an dieser Stelle Dr. Zamenhof begrüßten. Aufnahmen: Verkehrsverein Bad Nauheim (Limpert)

# Ĉu „artefarita“? De D-ro Anton Paul

Vera esperantisto deziras varbi por Esperanto. Do li parolas kun siaj amikoj, samprofesioj, konatoj pri Esperanto, kompreneble nacilingve. Multaj alparolitoj levas la ŝultrojn, kelkaj ŝajne interesiĝas por la ideo, sed bedaŭrinde ili ne havas la tempon por mem lerni, aŭ ili estas jam tro maljunaj — ĉikaze eĉ tridek-jaruloj taksas sin tro maljunaj por lernado! — kaj nur malmultaj efektive fariĝas esperantistoj.

Multaj moke kontraŭparolas, kvankam ili ne konas la lingvon. Ni esperantistoj ne neglektu ĉi tiujn duonkontraŭulojn kaj plenkontraŭulojn, ĉar ili sukcesas per siaj kontraŭdiraĵoj multe pli ol ni per niaj varbdiraĵoj: estas ja pli oportune por la varboto konsenti la kontraŭdiraĵojn, ĉar tiam oni ne bezonas klopodi pri lingvolernado!

Bedaŭrinde mi ofte devis konstati, ke ni esperantistoj ne nur neglektas tiajn kontraŭdiraĵojn, sed eĉ mem donas al la kontraŭuloj la vundantajn batalilojn. Ni mem ofte malfortigas nian propran varblaboron, sencepente konsentante la kontraŭdirajn esprimojn. Ekzemple, ni ĉerpas la varbmotivojn ĉiam denove el la jam historia trezoro de la komenco de nia movado. Ĉiam denove ni motivas la pravon kaj la rajton de Esperanto per la samaj diraĵoj kiel la majstro antaŭ kvindek jaroj kaj ŝajne ni forgesas tute, ke intertempe dum ĉi tiuj kvindek jaroj la situacio ege ŝanĝiĝis, ke la motivoj de iam hodiaŭ ne plu validas, almenaŭ ne plu gravas!

D-ro Zamenhof devis entute enkonduki la ideon de internacia neŭtrala lingvo. Cetero antaŭ kvindek jaroj lia lingvo estis genia eksperimento. Hodiaŭ Esperanto ne plu estas eksperimento sed vivanta fakto. Hodiaŭ ni ne plu bezonas persvadi la mondon al la internacia lingva ideo, ni devas gajni la mondon por la praktika aplikado de Esperanto. Tamen povas okazi, ke iu altrangulo, ne emanta pripenso, kion li ja ne konas, fingromontras al varboboŝureto kaj, ne leginte ĝin, asertas ke „artefaritaĵo“ nepre estas sensukcesajo.

Ho, kiel mi ĉiufoje ĉagreniĝas, kiam mi aŭdas tiun „artefarita“! Tiu ĉi esprimo estas ne nur maller-

tajo sed ankaŭ ne ĝusta! Ni esperantistoj certe komprenas la „artefarita“ tute alisence ol neesperantistoj: Homo ne jam konanta nian lingvon ĝenerale opinias „artefarita“ samsignifa kiel nenatura kaj nevivanta arbitraĵo, li eble imagas paperfloron, kiun li certe malŝatas. Antaŭ ol li konatiĝas kun la ĝusta kompreno, lia de ni dezirata favoro por Esperanto jam estas for, kaj li forŝovas la tutan ideon.

Fiere li montras al sia nacia lingvo kaj ofertas ĝin kiel taŭgan mondlingvon, ĉar ĝi — laŭ lia opinio — ne estas artefarita.

Kiu jam efektive pripensis kaj esploris la veran naturon de naciaj lingvoj? La plimultaj homoj — eble mi devus eĉ diri: la plej multaj — havas pri lingvonaturo kelkajn nepripensitajn opiniojn, havas ĉi-rilate senkonscie eĉ antaŭjuĝojn. Ekzemple, ĉiu klerulo kaj ĉiu kulturaciulo kredas, ke ilia nacia lingvo estas kulturlingvo (kulturita lingvo), nur ĉar la nacio mem aŭ almenaŭ granda parto de la nacio ja estas kulturita. Sed tio ne estas pruvo. La lingvo de alte kulturita kaj civilizita popolo tute ne devas esti nepre ankaŭ kulturita. Bonvolu atente observi la kulturhomojn: ili ja ne estas kulturitaj en efektive ĉiuj rilatoj. Aŭ ilia ekstera sintenado estas altnivela aŭ ilia interna, — sed ne ĉiuj partoj de ilia naturo. Se tuta nacio estus kulturita en ĉiuj rilatoj, certe ne plu ekestus militoj! Sed fakte militoj estas, kaj devigemo kaj ekspluatado, bataloj, disputoj kaj malamo inter la homoj kaj inter gentoj kulturitaj. La tuta homara vivo: socia vivo, ekonomia vivo, politika vivo ktp. provas ĉiutage, ke la homaro, la popoloj, la homoj bedaŭrinde nur parte estas kulturitaj, kvankam ili kredas sin plenkulturitaj.

La naciaj lingvoj estas plejmulte ankoraŭ sovaĝaj, parte duonkulturitaj. Ni parolas pri „la“ angla, franca aŭ germana lingvoj, kvazaŭ lingvo estus ia tutaĵo kaj unuaĵo, aŭ kvazaŭ lingvo estus organismo kreskinta laŭ propraj (memstaraj) leĝoj el speciala praĉelo.

Sed kia estas la reala lingvo? Lingvo de balbutantaj infanoj, de lertaj komercistoj, de stultuloj kaj intelektuloj, de poetoj kaj sciencistoj, de tre simplaj homoj kaj de ruzaj ĵurnalistoj ktp., kaj ili ĉiuj havas siajn proprajn „lingvojn“, kvankam ĉi tiuj diversaj lingvoj ŝajnas nur unu lingvo.

La unu homo havas eble nur tre malgrandan kaj simplan vortrezoron, kaj lia frazformado estas mallerta kaj eĉ malĝusta laŭ gramatika vidpunkto. La dua havas ja grandan vortprovizon kaj estas tre lerta frazformanto, sed tamen por li la lingvo estas tute alia ilo ol ekzemple por poeto. En la buŝo de poeto la ŝajne sama lingvo fariĝas belartaĵo, en la buŝo de politikisto nur artifaĵo.

Ĉiu homa lingvo estas homefarita. Tio validas hodiaŭ en la ĉiu-



Es sprich S-ano Dr. Tschobanoff, Sofia. Unter der Girlande die Gedenktafel mit der Inschrift: „In diesem Hause wohnte im Herbst 1907 Dr. L. L. Zamenhof, der Erfinder der Weltsprache Esperanto.“

## Fortsetzung von Seite 1

Bedeutung für Gegenwart und Zukunft. Er wies auf die zahlreichen Projekte für eine zwischenvölkische neutrale Hilfssprache hin, u. a. auf die von Amos Comenius und Descartes und auf die Zeichensprache (Pasigraphie) des Philosophen Leibniz, erklärte die Überlegenheit des Esperanto mit seiner Naturnähe in Wortschatz und Sprachgesetzen. Esperanto sei keine künstliche Sprache, sondern ein regularisiertes Hocheuropäisch. Um die politische Rivalität zu vermeiden, brauche die werdende Welt Demokratie eine leicht erlernbare, ausdrucksfähige, neutrale Hilfssprache zur Erleichterung des Austauschs und als sprachliche Brücke zur Annäherung der Völker. Die Lebenskraft der Esperanto-Bewegung beweisen ihre große Literatur und ihre Weltorganisationen, ferner auch die von 16 Millionen Unterschriften unterstützte Petition für Esperanto an die UNO.

Nach der Enthüllung der Gedenktafel durch Beigeordneten Dr. Havermann sprachen ausländische Esperantisten ihren Dank an Nauheim aus.  
Dr. J. Kreuzer

taga vivo kaj validis jam antaŭ jarcentoj. Jam ekde la komenco en la pratempo ĉiu lingvo estas homefarita, ĉar ĉiu homa lingvo ja estas farata de la parolantaj homoj, do parolante farata, parte nekonscie kvazaŭ hazarde kaj parte ja intence. Preskaŭ ĉiu poeto kreis novajn vortojn aŭ ŝanĝis formojn aŭ sencojn. Preskaŭ ĉiu grava verkisto, filozofo, sciencisto laboradis pli-malpli pri la evoluo de sia lingvo per sia lingvonuzado; ĉar por li la lingvo ja estas la nepre necesa esprimilo kaj li formas aŭ ŝanĝas ĉi tiun ilon laŭ sia laborelo — same kiel ĉiu lerta metiisto formas aŭ ŝanĝas siajn ilojn laŭ la laborintenco. Ĉi-rilate oni povas kompari la lingvan teritorion kun la tek-

## In der nächsten Nummer:

Nova Zamenhofaĵo?

Travivaĵoj kun D-ro Zamenhof  
Lingvaj Konsilejo kaj Konsultejo

La paĝo por ŝi!

Alibioj (Fino)

S-ta Nikolao volis modernigi

La Nekonatinato de R. C.

Muschler



# WIR STENOGRAPHIEREN ESPERANTO

nach dem deutschen amtlichen Einheitssystem

Bearbeitet von Wilhelm und Hans Wingen

## Erstes Lehrstück

Soweit im folgenden nichts Besonderes gesagt wird, stimmen Zeichen, Selbstlautsinnbilder und Regeln mit dem deutschen System überein. — Beachte: c = deutsches z; kv = qu; ks, kz = x; s = s (ebenso bei st, str, sp, spr); ŝ = sch (ebenso bei ŝr, ŝm, ŝn, ŝv); v = w. eŭ = eu. — Die Abstrichzeichen für st, str, tr dürfen immer angewandt werden. —

Die Bezifferung stimmt rechts und links überein; links steht die Übertragung der stenografischen Beispiele.

1. varme sendi ŝerci ŝvebi ŝmiras ŝraŭbi spite stari strange kvar taksi neŭtrale;
2. -o des Hauptwortes fällt am Ende weg: placo kvadrato ringo ŝranko spegulo stilo strato vespero festo teksto familio ŝuo;
3. -on (4. Fall!): dankon laŭdon filon daton Dion fakton veston;
4. -aj (ajn, ajt ausschreiben!): rajdi hajlo fajro belaj belajn varmajn dikajn ŝajnas rajto;
5. ĉ: ĉevalo ĉerko plaĉi ĉesi riĉulo ĉefo ĉambro dediĉi kruĉo kaŭĉuko;
6. Endungs-a: (kurzer Flachstrich) sata vera bela riĉa dika laca estimata alta lasta familia pia
7. Kürzel aus dem Deutschen: a) da dis doktor ent ant ial in inter ion- kon mis tag; b) aus den wahlfreien Bestimmungen: ism pro sub (= suk-) trans. des
8. Neue Kürzel (= K) la hav- for ĉe ĉu en estas kaj kun ne nek

**Leseübung (= L.):** glaso da vino, diskuti entrepreni anteno materialo indiki intereso regiono kontenta misiri kuri anglismo promesi progreso subteni transdoni; havas havis havos havus havi havigi havu, forlasi foriri, engluti, la enhavo, kunveni kunsido kunligi, nevera nenecesa negrava. — Tempo estas mono. La ŝajno trompas. Nova stato, nova vivo. Teni la langon en la buŝo. Nek viando, nek fiŝo. Sata stomako ne lernas bone. Altan arbon batas la fulmo. Eĉ el sub la tero aperas la vero. La fino kronas la verkon. Kritiki estas facile. Homo proponas, Dio disponas. Laboru kaj esperu. Tro da bono ne turmentas. Facile estas danci, se la felĉo kantas.

I.

1. varme sendi ŝerci ŝvebi ŝmiras ŝraŭbi spite stari strange kvar taksi neŭtrale

2. -o des Hauptwortes fällt am Ende weg: placo kvadrato ringo ŝranko spegulo stilo strato vespero festo teksto familio ŝuo

3. -on (4. Fall!): dankon laŭdon filon daton Dion fakton veston

4. -aj (ajn, ajt ausschreiben!): rajdi hajlo fajro belaj belajn varmajn dikajn ŝajnas rajto

5. ĉ: ĉevalo ĉerko plaĉi ĉesi riĉulo ĉefo ĉambro dediĉi kruĉo kaŭĉuko

6. Endungs-a: (kurzer Flachstrich) sata vera bela riĉa dika laca estimata alta lasta familia pia

7. Kürzel aus dem Deutschen: a) da dis doktor ent ant ial in inter ion- kon mis tag; b) aus den wahlfreien Bestimmungen: ism pro sub suk.

8. Neue Kürzel (= K) la hav- for ĉe ĉu en estas kaj kun ne nek

**Übertrage (= U):** kvin boksi bildo taktio daton strion lakton fajfi vespaĵne ĉeko broĉo granda fila vanta. — Promeso ne satigas. Plena stomako laŭdas la faston. Granda nuboj, eta pluvo. Laŭdu tagon nur vespere. Bono posedata ne estas satata. For el la mano, for el kalkulo. En luma tago. Fari la lastan spiron. Fremda korpo ne doloras. Riĉulo havas grandan parencaron. — Taso da kafo, disŝiri antagonismo speciala inciti interveni legiono kondiĉo mispaŝo muro problemoj subtrahi sukceso transpreni.

nika teritorio. La sciencisto aŭ verkisto ja devas fari tion (ŝanĝi la lingvon, eltrovi novajn vortojn ktp.) ĉiam, kiam la lingvo ne sufiĉas por esprimi la novan penson, la novan intuicion, la novan eltrovon. Kaj krom la verkistaj intencoj ankaŭ ĉiu alia homo volo, ĉiu arbitro, ĉiu pasio aŭ emo trovis sian esprimon. Tiamaniere kaj tial la lingvoj kreskis kiel praarbaroj: sovaĝe, senorde. — kaj ĉiu kontraŭdiraĵo, ĉiu arbitraĵo, sensencaĵo, banalaĵo, ĉiu aĉaĵo povis eniĝi kaj efektive eniĝis en ĝin.

Estis neniam regulo en ĉi tiu kreskado kaj formado. Ĉiu lingvonuzanto priatentis nur la proprajn necesojn. Li transprenis la gentan lingvon, kia ajn ĝi estis, kun ĉiuj fleksadkutimoj, frazelementoj. Kiam li sentis sin devigita esprimi novan ideon ktp., li bezonis novan vorton, novan esprimon, kaj li inventis tion aŭ hazarde aŭ laŭ propra volo aŭ laŭ jam ekzistanta ekzemplo. La poeto provis plibeligi la lingvon, sed la ĵurnalisto faris el la oro de

la poeta lingvo la ĉiutagajn monerojn de eleganta gazetlingvo. Tiamaniere kaj aliamaniere (ĉar mi nur povas aludi la haoson lingvan) fariĝis ĉiuj naciaj lingvoj sufiĉe arbitraj, ege senordaj kaj tute sovaĝaj. Ili similas praarbarojn. Oni ja povas diri, ke ankaŭ praarbaroj havas siajn belajojn, siajn admirindaĵojn, jes ja, certe, tamen ekzistas pli granda beleco aŭ minimume alispeca beleco. Kaj certe tiaj praarbaroj havas siajn malavantaĝojn.

Ĉiuj provoj de la poetoj kaj de la sciencistoj ordigi kaj plibeligi la nacian lingvon, do: kulturi ĝin, restis provoj kaj ne povis sukcesi. Ilia laborado similas batalon kontraŭ muelillugiloj, similas batalon kontraŭ drako kun dekdu kapoj. Tiu ĉi drako estas la kutimo kaj la persistforto de la nepensema amaso. Oni ja parolas por esti komprenata, tio devigas onin paroli tiel, ke la alia komprenas. Do mankis al la reformemuloj la potenco, forigi la jam enhavatajn malordajojn. Ili pov-

vis ŝanĝi ĉiam nur iomete, nur etajn erojn de la lingvo, kaj ĝis la sekvanta reformprovo jam la celo ŝanĝiĝis kaj la imago de la taŭgaj rimedoj, ĉar ankaŭ la reformemuloj mem ŝanĝiĝis intertempe. Proverbo diras: Tro da kuiristoj kaŭon difektas. Neniam ĉi tiu proverbo pli pravos ol ĉe la evoluado de la naciaj lingvoj.

Cu do la naciaj lingvoj estas artefaritaj? Ne, ili estas eĉ arbitrefaritaj! Ili estas denature sovaĝaj, ĝisfunde nekulturitaj. Nur lingvo farita de unuopa genia homo povas esti aŭ fariĝi vera kulturlingvo.

Kaj tiu ĉi genia homo jam venis. Li konis la penigan laboradon de la lingvistoj, kiuj esploris la lingvajn praarbarojn kaj trovis kelkajn mallarĝajn vojojn tra la densaĵo. Tion ili nomis la regularo, sed la regularo havas aregon da escetoj.

La genia homo komparis la regularojn el multaj lingvoj; li ekkonis ke multaj reguloj ne estus necesaj, se la lingvoj ne estus sovaĝaj

## Aktuala Terminareto

Anschlag(stift) haltiga stift  
 die Behörden oficialaj (ŝtataj, komunumaj) instancoj  
 Behördenabbau reduktado de la oficejaro  
 Betriebsrat dungitara komitato  
 Bewirtschaftung (ŝtata) vendokontrolo; porciumado  
 Bunker bunkro  
 Demontagestop haltigo, ĉesigo de malmuntado  
 einige zwanzig dudek-kelkaj  
 einige hundert kelkcent  
 Erfassung registrado; produktontrolo  
 Fallschirm paraŝuto  
 ~springer, ~jäger paraŝutisto  
 Fehlfarbe (Zigarren) miskoloro  
 Fließband, laufendes Band senfina, ruliĝanta bendo  
 Gelbfilter flava lumfiltrilo  
 Jazzband auch: jazorkestro  
 Klubsessel fotelo  
 Konservendose konservaja skatolo  
 knitterfrei neĉifiĝa  
 Kultusminister kulturministro  
 Logarithmentafel, 7-stellige 7-decimala logaritmotabelo  
 Mine, Luft- aermino, Bleistift- grafitajo  
 Modeheft modgazeto, modellibro  
 Nahaufnahme deproksima foto  
 Nahschnellverkehr distrikta rapidvagonaro, -trafiko  
 Roller (Spielzeug) skutilo  
 Rückspiegel rerigarda spegulo  
 Rückstrahler, Katzenauge reflektilo  
 Schauprozeß spektakloproceso, formala ~  
 Schlußlicht malantaŭa ampoletio  
 Schlüsselindustrie baza, fundamenta industrio  
 Schüttelreim literŝanĝa rimo  
 Sonnenbrand suna haŭtinflamo, -brulumo  
 Tank benzinujo, tanken preni benzinon, Tankstelle benzinprenejo  
 Trecker traktoro

Trümmersplitt ruinbrikeroj, ruinŝtonaĵo  
 Übergangskleidung intersezona vestaro  
 Ultraschall besser: ultrasonondo  
 Viertaktmotor kvartakta, kvarfaza motoro  
 Werkspionage industria spionado  
 Werkstudent fabriklaboranta studento  
 Winker direktindikilo  
 Zeitlupe malrapidiga filmado  
 Zeitraffer tempakcela filmado  
 Zubringerstraße alkonduka strato  
 Zucker, Kuba- Kuba sukero, Würfel-sukerkubetoj.

Hans Wingen.

## Ne diru „hop“ antaŭ la salto!

En la Zamenhofa „Proverbaro Esperanta“ ni trovas ĉi-supran konsilon, kies senco estas: Agu nur

en la ĝusta momento! Sed en instrulibro aŭ en aliaj Esperanto-verkoj ni legas kiel tradukon: Abwarten und Tee trinken. — Ĉu tio estas ĝusta, laŭsenca aŭ fantazia interpreto? — Enketinte inter samideanoj mi konstatis, ke neniu sciis ion pri la origino de tiu eldiro, kiun multaj aplikas aŭtomate, arbitre, papagmaniere; kelkaj opiniis ĝin ŝercaĵo aŭ signifiĝa parolturno. — Nu, tia ĝi tute ne estas. Ni migru spirite al Cinujo por ekscii la veran signifon. Laŭ ĉina kutimo oni bonvenige regalas ĉiun vizitanton per taso da teo, antaŭ ol demandi lin pri la kialo de lia veno aŭ preparoli kun li komercajn aferojn, se temas pri tiaj. Gentileco kaj bona moro postulas tian konduton. Nekonata al Eŭropanoj estas la multceremonia procedo en la teopreparado, kvazaŭkulta ĉe la flavhaŭtuloj. La gasto devas disponi pri multe da tempo kaj pacienco. Ankaŭ ne decas, ke la gastanto tro rapide sorbesuĉante trinkas la teon. Poste komenciĝas la konversacio pri la celo de la vizito, ĉar nun la ĝusta momento estas veninta. — Oni eble pli klare ekkonus la sencan de la germana esprimo, se ĝi tekstus: Abwarten und erst Tee trinken.

M. Butin.

# Logiko kaj Lingvouzo

Ekstrakto el prelego de Wilh. Wingen dum la GEA-kongreso en Mainz

(Fino)

Krom Zamenhof ankaŭ verkistoj el aliaj landoj enkondukis plursignifajn vortojn, kaj estas nur nature, ke ĉe tio ili sin gvidis laŭ la kutimoj de siaj respektivaj lingvoj. Simile estis pri parolturnoj kaj eĉ idiotismoj, ĉerpitaj el ilia gepatra lingvo. Se tiuj detaloj estis komunaj al diversaj aliaj lingvoj kaj ne tro akre kontraŭstaris la logikecon, ili trovis pli-malpli ĝeneralan aprobon kaj tiamaniere riĉigis nian lingvon. Kun la tempo tiel estiĝis nia hodiaŭa lingvouzo, kiu, cetere, grandparte devenas jam de Zamenhof mem.

„Sed kial — eble demandas pursanga reprezentanto de la logiko — kial atribui al la lingvouzo tiom da graveco? Por praktike uzi Esperanton, plene sufiĉas scii ĝiajn gramatikon kaj vortaron kaj esprimi siajn pensojn ĉiam logike. Farante tion, oni tute ne bezonas specialan lingvouzon!“ Kontraŭ tia opinio, per si mem prava, tamen parolas kelkaj gravaj argumentoj. Ni ne devas forgesi, ke ĉiu el ni jam de sia infanaĝo alprenis lingvajn kutimojn, kiuj profunde enradikiĝis kaj kiujn poste rezigni ne estas facile. Tion pravas evidente la neintencita uzo de naciismoj ne nur en konversacioj, sed eĉ en libroj, do en tekstoj, pri kies „pureco“ de stilo la verkintoj havis sufiĉe da tempo por pripensado. Tion saman pravas ankaŭ la fakto, ke eksterlandano havanta aliajn lingvajn kutimojn konstatas niajn naciismojn tuj, dum samlandano ilin ofte ne rimarkas. Do, se ĉiam ni devus paroli logike, t. e. konstante demeti niajn ĝisnunajn kutimojn, ni per tio altgrade malfaciligus al ni la uzadon de Esperanto.

Dua demando estas, ĝis kiu grado ĉiu el ni kapablas pensi logike. Certe, ekzistas homoj kun granda natura talento pri logiko, kaj por ili logika esprimmaniero ĝenerale estas relative facila. Sed lingvo destinita por la „granda amaso“ ne rajtas konsideri nur tiujn tipajn logikulojn; kontraŭe, ĝi devas en siaj postuloj adaptiĝi al la kapabloj de la plimulto.

Unuavide povus ŝajni, ke speciala lingvouzo malfaciligas la lernadon de nia lingvo; ĉar tiukaze temas jam ne nur pri la lernado de gramatiko kaj vortaro, sed krome pri la detaloj de la lingvouzo. Esence tio estas ĝusta, sed la afero aspektas pli danĝera ol ĝi efektive estas. Grandparte la lingvouzo en Esperanto — precipe la plursignifaj vortoj — estas identa kun niaj nacilingvaj kutimoj, kaj tiu grandan parton ni kompreneble ne bezonas lerni. Al ĝi apartenas ĝuste vortoj plej gravaj, plej ofte uzataj kaj plej malfacile esprimeblaj per rimedoj de la logiko! Do restas nur tiu malpli granda parto, en kiu la lingvouzo adoptis la kutimojn ne de nia propra lingvo, sed — pro kaŭzoj de pli granda internacieco — la kutimojn de aliaj naciaj lingvoj, aŭ logikan esprimmanieron fariĝintan tradicia.

Resume la problemo stas jene: kio estas pli facila por la granda plimulto: ĉu lernado de relative malgranda kvanto da detaloj aŭ ĉu konstanta rezigno pri niaj kutimoj, ligita kun seninterrompa streĉo de niaj logikaj kapabloj dum ĉia aktiva aplikado de la lingvo? Ekzistas ankoraŭ tria eblo:

## Ĉu „artefarita“?

praarbaroj sed — kulturitaj ĝardenoj. Li ankaŭ vidis, ke kelkaj reguloj en la diversaj lingvoj similas unu la alian, li vidis, ke plena ordo eblas. Mi ne bezonas klarigi tion pli detale, ĉar la leganto jam scias, ke mi parolas pri D-ro Zamenhof kaj pri Esperanto. Kiam nacia lingvo estas praarbaro, tiam Esperanto estas parko, homefarita, tamen vivanta. Esperanto estas la sole vivanta kulturita lingvo. La grava diferenco inter nacia lingvo kaj Esperanto estas, ke Esperanto estas kulturita kaj la nacia lingvo estas ne kulturita. Tial ni estonte ne plu apliki la mallertan kaj neĝustan terminon „artefarita“, sed la pli ĝustan terminon „kulturita“. Kaj ni havu estonte la kuragon nomi la naciajn lingvojn laŭ la vero: „naturaj lingvoj“ aŭ eĉ: „sovaĝaj lingvoj“, „nekulturitaj lingvoj“. Kaj ni diru la veron tiel longe, ĝis la vero estos konata inter ĉiuj homoj!



rezigno pri niaj kutimoj kaj encerbigoj de nova, nekutima lingvouzo pure logika. Evidente ĉi tiu lasta solvo estas multe pli malfacila ol la unua kaj pro tio ne plu estas konsiderata ĉi tie.

Restas do, elekti inter la du aliaj vojoj. Por ĉiu, kiu bazas sian verdikton ne sur idealo pri la homaj menskapabloj, sed sur realaj faktoj, la respondo ne povas esti malfacila. Ĉiu sperta pedagogo scias, ke kvankam la lernkapablo de multaj ja ne estas tre kontentiga, ĝi tamen superas la kapablon por logika pensado, kiu cetere estas perfektigebla nur ĝis certa grado, kaj ankaŭ tio ja postulas tempon kaj laboron. Do, pli funda esploro de la problemoj montras al ni, ke entute la avantaĝoj kuŝas sur la flanko de la lingvouzo.

Cu per tio mi volas diri, ke logiko ne havu lokon en Esperanto? Tute ne! Logiko estas kaj ĉiam devas resti faktoro tre grava en nia lingvo. Jam pro tio, ke laŭlogika esprimmaniero ĉiukaze estas korekta. Tion ankaŭ akcentas jena diro de d-ro Zamenhof: „La diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke, dum en la unua oni devas uzi nur tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formoj pli logika estas malpermesita. . . en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formojn pli logikan kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis, kaj li povas esti konvinkita, ke se lia formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn imitantojn kaj iom post iom elpuŝos la malpli logikan, kvankam ĝis nun pli uzatan formon malnovan.“

Pesante la argumentojn por kaj kontraŭ, oni venas al la konkludo, ke ne la alternativo: logiko aŭ lingvouzo sur la tuta kampo de la lingvo devas esti la solvo, sed logiko kaj lingvouzo kun ĝusta limigo de la tereno, kie la unu aŭ la alia estu aplikata. Preciza fikso de tiu limo estas ĝis certa grado diskutebla. Ĝi ankaŭ ne estas necesa; ni povas permesi al ni toleremon, sed — por ambaŭ flankoj! Generale la situacio ja estas tia, ke preskaŭ neniu kontraŭbatalas la tendencon al logikeco, dum la logikemulo emas kritiki eĉ nedanĝerajn esprimojn nur pro tio, ke ili ne kontentigas lian vidpunkton de rigora logiko. Cefafero do estas, ke ankaŭ la defendanto de la logiko agnosku la ekzistojn de la lingvouzo.

